


Del Grupo Esperantista

# Boletín



Januario-Februaro

Año 2011

Nº 244

**Dirección de correo electrónico:** [lhernandezg@ono.com](mailto:lhernandezg@ono.com)

Dirección Postal: Pedro A. **Garrote Escribano** : C/ Las Mercedes, 5-5º-C

Adherido a la Federación Española de Esperanto

## Editorial

Una vez más, y por primera vez en este año 2011, llega a vosotros, ya por correo electrónico a todos aquellos cuya dirección nos es conocida; ya por correo ordinario, este boletín del Grupo Esperantista de Valladolid con las noticias y comentarios del mundo esperantista que consideramos pueden ser de algún interés para todos aquellos que tengan la voluntad y la curiosidad de leerlo.


Por la escasa o más bien, nula actividad que se desarrolla en Valladolid, tan sólo una reunión semanal en un café, actualmente en el Café Manhattan, los miércoles, a partir de las 7 de la tarde, en el que el pequeño grupo que asistimos, nos esforzamos por practicarlo; es por lo que tenemos que dar cabida en las páginas de nuestro Boletín a las actividades que se realizan en otros lugares tanto de España como de fuera de ella y que, a nuestro modesto entender, pudieran servir de alguna utilidad.

En este Boletín, incluimos un reportaje sobre un Encuentro Esperantista celebrado en Alemania y que nos ha sido enviado por correo electrónico por una esperantista amiga.

Lamentablemente, apenas han tenido eco nuestros llamamientos, para lograr vuestra colaboración, mediante el envío de noticias y/o comentarios en relación con el esperanto y con todo lo que gira a su alrededor.

Una vez más quisiera agradecer a todos los que contribuyen con su aportación económica, a que podamos seguir en la tarea que nos hemos impuesto, que no es más ni menos que la de informar, en la medida de nuestras posibilidades, de todo lo que acontece en el mundo esperantista.

Ánimo y a no dejarse vencer por la desgana y la apatía que eso es lo peor que nos puede pasar.



## La 27-a INTERNACIA FESTIVALO EN NÖRDLINGEN

Denove post unu jaro ni renkontiĝis en la bela bavara urbo Nördlingen por festi la 27-an IF. La urbo bonvenigis nin impresige blanke vestita. Pro rigora malvarma kaj neĝa vetero trajnoj malfruis kaŭzante al multaj partoprenantoj problemojn. Al la aranĝo aliĝis 111 personoj el 17 landoj, sed ne ĉiuj povis veni. Tamen la festivalo estis tre sukcesa.

Belkolora IF-broŝuro konatigis nin kun la semajna programo.

Gepatroprenantoj en la 27an IF. meze B. Moon kaj F. Gabalda

Ni ĝuis altkvalitajn prelegojn kaj vesperajn kulturajn prezentaĵojn. Pluraj prelegoj traktis la kadran temon pri lingvoj; ni povis konatiĝi kun la hebrea, armena, nederlanda, luksemburga, dana, rusa kaj ankaŭ kun lernigaj teknikoj por lingvoj. Tacuo Huĝimoto el Japanio klarigis pri idiolekto, dialekto kaj idiomomo. Krome oni povis sperti gestan lingvon kaj lingvon de fabeloj. En la mondo ekzistas miloj da lingvoj, sed nia Esperanto estas la plej facila kaj belsona. Ni praktikadis ĝin ĉiutage en gaja, agrabla kaj amika etoso.

Estis okazo promeni en la urbo, rondiri la urban muregon, viziti preĝejan turon kaj lokan muzeon. Plurfoje ni povis sekvi vojaĝprelegojn kun allogaj bildoj: tra Rusio al Mongolio per transsiberia trajno, pri Kubo, Brazilo kaj Bona Espero, Maroko de la nordafrika Atlaso ĝis Saharo, ĝui bildfabelojn kaj aŭskulti operojn. Aparte interesaj prelegoj temis pri: kosmo kaj meteorŝtonoj, pri longitudo, pri reta esperanta proverbaro, pri vintraj sportoj, pri efiko de korea ginsengo kaj kuracado laŭ metodo de pastro Kneipp, pri Aleksandro Dumas kaj Antoine Galland kaj aliaj. Pri perkomputila foto-prilaborado konatigis nin Rémy, kiu mem sukcese spertiĝas en tiu-ĉi ŝatokupo. Per mandalismo ni provis trovi solvojn pri la estonteco de IF. Tuj naskiĝadis ideoj kaj proponoj por plibonigoj... Filmo pri la pasintjara IF refreŝigis memoron pri la antaŭa aranĝo.

Okazis la 4a IVU, skribaj E-ekzamenoj laŭ la normoj de la Eŭropa Referenckadro, funkciis libroservo. "Posidelki" kun Ljuba el Rusio donis okazon agrable babili ĉe teo-trinkado kaj gustumi kelkajn bongustaĵojn el Rusio. Siajn novajn librojn prezentis dum aŭtora horo Mikaelo Bronŝtejn. Matene okazis gimnastiko, posttagmeze jogo, plurfoje eblis ĝui saŭnon. Mi, inspirita de vojaĝado en Kubo, invitis dancŝatantojn al afrokuba dancvespero. Interkonan, distran kaj internacian vesperojn gvidis Mikaelo Bronŝtejn, dagestanan vesperon Aĥman Junusov. Josi Ŝemer preparis interesan kvizon. Nia magiisto Triksini amuzis nin per novaj trukoj. Ĉiuvespere ni kunĝuis restadon en nia ŝatata "Knajpo".

La 30-a de decembro ni tradicie ekskursas. Ĉi-foje ni vizitis la bavaran ĉefurbon - Munkeno. Tie ni tagmanĝis en barelforma restoracio kaj iom promenis en la urbo. Sed la plej interesa kaj atendata parto de la semajno estas la silvestra nokto kun abunda bufedo, balo inaŭgurita per polonezo kaj speciale festa etoso dum bonvenigo de pluraj Novjaroj laŭ la diversaj horzonoj de la ĉeestantaj partoprenantoj. Do, brakumado, tostado kaj kisoj tiuvespere abundas.

Korajn dankojn kaj gratulojn al nia ĉeforganizanto Hans-Dieter Platz (HDP), kiu sukcese dum pluraj jaroj aranĝas por ni neforgeseblan semajnon kaj zorgas pri ĝia bona disvolviĝo. Jarfine ni renkontiĝos en la 28a IF, ĉi-foje en Xanten. Bonvenon al vi ĉiuj!

**L. Gabalda**

## ***PLURALISMO CULTURAL Y DIVERSIDAD LINGÜÍSTICA***



La Unesco, organización internacional, con sede en París, dedicada a la Educación, Ciencia y Cultura, proclamó en noviembre de 1999, el **Día Internacional de la lengua materna**, que se celebra el día 21 de febrero de cada año, con la finalidad de defender la diversidad lingüística.

Es un hecho conocido, que es muy importante mantener la riqueza cultural que cada lengua conlleva, sea lengua muy difundida o lengua minoritaria, porque cada una de ellas contiene toda la referencia cultural de sus hablantes, de sus pueblos y de su manera de pensar, o sea lo que se denomina *el patrimonio inmaterial del mundo*. Por eso, especialmente desde 2007 Unesco exhortó a sus Estados miembros a proteger todos los idiomas del mundo, y la Directora General de Unesco, Sra. Irina Bokova dijo en febrero pasado, claramente, que *“cada lengua representa una manera única de entender, escribir y expresar la realidad”*.

Y sin embargo, Unesco reconoce que la mitad de los seis mil idiomas existentes en el mundo, está en peligro de extinción, por eso el 21 de febrero de este año, en la sede de la Unesco, se celebró una reunión donde se debatió el tema y ya insertos en el mundo moderno, se puso de relieve el papel de las nuevas tecnologías para salvaguardar el uso de las lenguas maternas, conociendo las redes sociales Twitter y Facebook.

Recordemos que esperanto, desde sus orígenes ha cumplido la finalidad de, por medio de un idioma neutral, defender los idiomas minoritarios y desde siempre se ha dicho “cada uno con su idioma y Esperanto para todos”, lo que ha hecho que los valores de Esperanto hayan sido reconocidos por la Unesco, como afines a los suyos, en la Conferencia Internacional de 1954 y 1985.

Avanzando en estos temas, Unesco en 2005, declaró la diversidad lingüística, patrimonio común de la Humanidad, en la defensa de todas las lenguas, contra el uso de una lengua hegemónica, lo mismo que defiende Esperanto. En este contexto Unesco reconoce que *la lengua es el vehículo del patrimonio cultural inmaterial y este patrimonio ha de ser vivo, transnacional y que garantice el desarrollo sostenible de generación en generación*.

Esperanto cumple, desde sus orígenes, estas tres funciones, pues es una lengua hablada o sea *viva*, por personas del mundo entero. Es *multinacional*, porque desde su creación por el Dr. Zamenhof, se aprende y se habla por personas de distintas naciones, pues no existe un solo Estado donde solo se hable esperanto. Asimismo, *garantiza el desarrollo sostenible*, porque las personas que lo aprenden y ejercitan se desarrollan culturalmente por los intercambios existentes y en los más remotos pueblos de la tierra hay esperantistas que ya solos, o en grupo, han aprendido esperanto y lo usan extendiéndolo de generación en generación, eso sí, extendiéndose más en unos puntos geográficos o en otros según el avance de los años.


Si en principio se extendió por Europa, después por América del Norte, hoy florece en Asia, América del Sur, e incluso en África, y se aprende, no tanto en las tradicionales asociaciones, como por Internet y las redes sociales.

Esperanto es realmente una lengua ecológica, en el sentido de que es una lengua neutral, que todos tienen que aprender y al ser una lengua neutral no excluye a ninguna otra, y contribuye a evitar la discriminación lingüística, como bien sabemos los esperantistas.



## Tra la Mondo

### PRI ERASMO EN LA MAJA MALFERMA TAGO



Antaŭ 500 jaroj aperis la plej fama verko de Erasmo de Rotterdam Laŭdo de l'stulteco, per kiu la granda pensulo Erasmo de Roterdamo (1466-1536) en satira formo atakis ĉiajn antaŭjuĝojn kaj superstiĉojn.

Sekve la 34-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA omaĝos la Erasmo-jubileon per du prelegoj. D-ino Věra Barandovská-Frank faros ĝeneralan enkondukon al la vivo kaj verkaro de Erasmo, kaj Gerrit Berveling prelegos pri Laŭdo de l'stulteco, kiun li esperantigis el la latina originalo. La traduko aperis en 1988, okaze de la 73-a UK en Roterdamo.

La 34-a Malferma Tago okazos sabaton, la 14-an de majo, de la 10-a ĝis la 17-a horo. Krom la du prelegoj pri Erasmo kaj lia klasikaĵo, en la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj (el la gazetara servo de UEA)

### Esperantistoj en radio


Radio Exterior de España dissendis la 8an Februaro intervjuon pri nia lingvo al Toño del Barrio, direktoro de Fundación Esperanto. La 20-minuta registraĵo aŭdeblas per jenaj ligiloj: **RADIO EXTERIOR**, **IPERNITY**

Alia intervjuo, ĉi-foje en Radio Nacional de España, en ties programo "Esto me suena" de la 10a Februaro, kun la prezidanto de HEF, Pedro Hernández, aŭskulteblas pere de la ligilo **RADIO NACIONAL DE ESPAÑA** (el la retpaĝo de HEF)



### Esperanto en prelegejo de Strasburga universitato

La fako pri interpretado de la Strasburga universitato en Francio jam de 2007 havas regulajn kontaktojn kun esperantistoj. Komence esperantistaj interpretistoj aĉetis trejnadon por si mem, poste la kontaktoj evoluis, kaj la esperantisto Cyrille Hurstel estis invitita en la ĵurion kiu akceptas novajn studentojn, ĉar li proponis novajn ideojn por pritaksi la kvaliton de la interpretado.





## HUMORO

### CONVERSACIÓN ABSURDA

Un ciego le pregunta a un cojo: - ¿Qué tal andas?

Y el cojo le contesta: - Pues ya ves.



#### Drasta Solvo

Fino de monato estas plej malfacila tempo en malgranda vaganta cirko. Laboranto venis al direktoro kaj sciigas lin:

- Mastro, venis viandisto, li volas ricevi monon kontraŭ viando por rabobestoj.

Direktoro (malfermante kaŝon de leono): - Li iru.



#### Pli bone ol nenio

Leganto venis bibliotekon kaj ĉagrenas:

- Mi prenis de vi la libron "Kiel gajni milionon", sed en tiu mankas duono da paĝoj.

- Ne bedaŭrindas. Duono da miliono estas ankaŭ bonega monkvanto.

#### Inteligenta Knabeto

- Imagu, mia trijara filo disŝiras kvindek paĝojn de mia nova novelo.

- Ĉu li jam povas legi?



#### SOLUCIÓN IMAGINATIVA

Una mujer acude al médico con el fin de que le recomiende algo para adelgazar. El consultado va y le dice:

- Es muy simple, señora. Sólo tiene que mover la cabeza de izquierda a derecha y viceversa.

- ¿Cuántas veces?.

- Cada vez que le ofrezcan comida.





**Somera Esperanto-Studado (SES-2011) tendrá lugar del 30 de julio al 07 de Agosto de 2011. ¡Esta vez en la ciudad de Nitra!**

El cuarto encuentro real de *lernu!* tendrá lugar en la parte occidental de Eslovaquia, en la ciudad histórica de Nitra, situada a 90 km de la capital Bratislava, a unos 160 km de Viena, capital austriaca, y a unos 155 km de Budapest, la capital de Hungría.

**El programa** se dividirá en:

- Mañanas: clases de Esperanto;
  - Tardes: excursiones, charlas, manualidades, actividades deportivas, trabajos en grupo etc.;
  - Noches: veladas nacionales e internacionales, conciertos, películas, discoteca...
- Las **clases de Esperanto** serán impartidas por expertos profesores de esperanto en cinco grupos según los diferentes niveles del dominio de la lengua.

Petu pli detalajn informojn al [igarmen@terra.es](mailto:igarmen@terra.es)

Periódico

GRUPO ESPERANTISTA  
Las Mercedes, 5 5° C  
47006 VALLADOLID